

## Alparolo de UEA-prezidanto

Karaj ISAE-aktivuloj, estimataj sciencistoj kaj subtenantoj de la uzado de Esperanto en scienco!

Estas granda plezuro ĉeesti en momento, kiam ISAE festas sian centjariĝon kaj estas tre emoci-dona la malkovro, ke niaj fruaj esperantistaj agantoj en la komenco de la pasinta jarcento fondis tiun ĉi Asocion inter la unuaj fakaj asocioj. Tio montras la gravecon, kiun jam tiam scienco havis en la menso de progresemaj homoj. Ili pravis, ĉar estas la scienco pli ol io alia, kiu transformis nian vivon dum la pasintaj cent jaroj. Kaj ĝi ankaŭ nun kontribuas al mondo pli paca kaj entute al la pluvivado de mondo, minacata de pereo pro klimataj kaj aliaj problemoj, solveblaj nur per scienca aliro.

Dum la ĵus pasintaj cent jaroj de kunlaboro inter UEA kaj ISAE, la legantoj de la asocia organo "Scienca Revuo" fieras pri tio, ke ni havas homojn, kiuj kapablas verki tiel malfacilajn tekstojn. Multaj multe pli kleraj ol mi certe parolos pri la akiroj de ISAE en tiu periodo kaj pri la sukceso, teni ĝin vivanta tra la plej grandaj homaj katastrofoj de la pasinta jarcento. Mi volas paroli pri la estonteco. Nia junularo postulas de ni, ke ni reorganizu la sciencan agadon per Esperanto tiel, ke ĝi povu funkcii ankaŭ en la nuntempa mondo. La linioj, ĉirkaŭ kiuj ni devos labori, povas esti pluraj:

– unuflanke ISAE, kiu havas sian belegan sidejon en kasteleto en Tavoleto, uzu tiun por regulaj sciencaj renkontiĝoj en Esperanto. La favoro de la urbo kaj de la urbestro nepre devas esti kaptataj de la estraro de ISAE;

– aliflanke ni provu multe plie agi rete, por trovi niajn gejunulojn, kiuj moviĝas nur en tiu ĉi medio;

– trie ni pliigu la kunlaboron de ISAE kun UEA kaj AIS, kaj ni eble produktu la unuan pra-desegnon de tutmonda 'Reta Malferma Universitato', kiu funkciu per retaj kursoj: memstara lernado hejme kaj uzado de ekzistantaj sciencaj centroj. Mi certas, ke la nepoj de niaj nepoj, kiuj kunvenos ĉi tie por festi la duan jarcenton de ISAE, nin benos.

Bondezirojn kaj longan sukcesan vivon al ISAE kaj Esperanto en scienco.

*D-ro Renato CORSETTI, prezidanto de UEA*





## Alparolo de ISAE-prezidanto

Cent jaroj estas longa historio, plena de eventoj kaj spertoj: historio, kiu alportis forton kaj prestiĝon. Cent jaroj de ISAE nek estas signo de aĝo nek volas superŝarĝi ĝin per sensencaj balastoj de memoroj. La vivo de Internacia Scienca Asocio Esperantista, la plej aĝa scienca asocio en la Esperanto-movado, estas mezurebla kiel periodo, kiel tempolongo. Cent jaroj markas la tempodaŭron de komenco ĝis fruktodona matureco. Cent jarojn ISAE – kun ŝanĝaj nombroj de membroj, ŝanĝaj nomoj de estraranoj, de prezidantoj. Cent jarojn de ISAE – kun diversfakaj aŭtoroj, kiuj vivigis kaj vigligis la asocian organon "Scienca Revuo" per artikoloj kaj tradukoj de nacilingvaj sciencaĵoj. Cent jaroj de ISAE estas, kaj tio estas privilegio de internacilingva fak-asocio eldonanta sciencan revuon, dek dekadoj de Esperanta lingvoevoluo.

La cent jaroj de ISAE ne estu iu fina punkto de alveno, signo de iu sukcese atingita celo, eĉ ne estu momento de paŭzo, de sterila restado. Pro tio ni festas la centjaran ekziston de nia Asocio en la formo de modesta scienca konferenco. Kaj per tio ni plej adekvate omaĝas tiujn homojn, kiuj ekde la fruaj fondojaroj konstruis kaj fundamentis nian centjaran historion per fidela ISAE-membreco aŭ en asociaj gvidaj funkcioj, kiel aŭtoroj por la asocia organo aŭ kiel landaj delegitoj.

La invito subteni tiun ĉi ISAE-konferencon per prelegoj resp. festkajeraj kontribuoj por Scienca Revuo celis ankaŭ al renkontiĝo de la generacioj. Mi elektis kiel konferenclokon kaj estontan centron por ISAE-aktivadoj la malgrandan vilaĝon Tavoleto en Italujo. Tie ĉi troviĝas krenelara Esperanto-Kasteleto, kiu montras forton kaj prestiĝon. Forton kaj prestiĝon bezonas ankaŭ ISAE por fosadi la sulkojn dum la dua jarcento de sia ekzistado. Mi malfermas la centjariĝjubilean ISAE-konferencon kaj deziras viglajn postprelegajn interŝanĝojn de ideoj kaj opinioj.

*Prof. d-ro Rüdiger SACHS, prezidanto de ISAE*